

Por la 30jariĝo de la Alvoko de la 13

**La 3an de marto 1996, la elektitaj delegitoj  
al la KONGRESO DE LA POPOLOJ  
lanĉas ALVOKON :**

**La 3an de marto 1966**, dek tri monde famaj Civitanoj de la Mondo lanĉis alvokon por la monda civitaneco,

**De tiam** miloj da homoj konsciaj pri siaj respondecoj al la tutmonda komunumo kaj al la estontaj generacioj, decidinte agnoski siajn rajtojn de membroj de tiu komunumo, petis sian registriĝon kiel mondcivitanoj kaj kontribuis per naŭ transnaciaj balotoj al la elekto de dek ok delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, anticipa Tutmonda Parlamento.

**Hodiaŭ**

**dum** oni konsentas pri la interdependeco de la mondaj popoloj ;

**dum** oni rekonas la transnaciecon de la malbonoj kaj minacoj, kiuj timigas la homaron ;

**dum** la UNaj instancoj, ĉar sen trudopovo, restas senpovaj kontraŭ la multformaj konfliktoj, el kiuj la etnaj konfliktoj ;

**dum** la ŝtata suvereneco ne plu estas netuŝebla;

dum ni lanĉas la dekan balotelekton al la Kongreso de la Popoloj,

**Ni denuncas** la daŭran strebadon de la naci-ŝtatoj al hegemonio malprofite al la Loĝantaroj ;

**Ni akuzas** la ŝtatojn, kiuj favorigas la sovaĝan tutmondiĝon, en kiu regas ĝangala leĝo, pretekstante liberalismon laŭdegas la konkurencecon, vera kialo de eksigo kaj de marĝenigo tiel de pli kaj pli multaj homoj de la socioj diritaj progresintaj kiel de la progresantaj landoj.

**Ni postulas**, ke estu konsiderataj la rezultoj de la diversaj grandaj Mondaj Konferencoj

organizitaj pri demografio, medio, progresado, inoj... - tio atestas pri ekapero de tutmonda publika opinio - kaj ni postulas, ke la produktitaj bonintencaj deklarioj ne restu sen sekvo.

**Ni admonas** la ŝtatojn transdoni parton de sia suvereneco profite al tutmondaj supernaciaj institucioj demokratie balotelektitaj, kiuj provizite per limigitaj sed realaj povoj, estus kapablaj labori favore al solidareco inter la popoloj de la mondo kaj starigi leĝojn komunajn al ili.

**VI, CIVITANOJ EL ĈIUJ LANDOJ,**

**ĉar vi estas la veraj posedantoj de la popola suvereneco,  
al vi apartenas konigi viajn aspirojn pri unuiĝinta mondo**

**DEKLARANTE VIN CIVITANOJ DE LA MONDO.**

**La 3an de marto 1966  
Alvoko de dek-tri monde famaj  
Civitanoj de la Mondo**

« **Manke de supernacia leĝo** la ŝtatoj estas devigataj kalkuli je forto por defendi siajn interesojn. Konsekvenco : la milito ĉu vola ĉu akcidenta iĝanta, depost la atoma malintegrado kaj de la disvolviĝo de la bakteriaj armiloj, la absurda "fina solvo", la genocido vastigita al la tuta homa raso..

**Manke de tutmondaj institucioj** kapablaj certigi la kontentigon de la fundamentaj bezonoj komunaj al ĉiuj, la homa persono estas ofendmokata. Dum grandegaj riĉaĵoj estas malŝparataj, du trionoj el la homaro suferas malsaton.

Tamen la sciencaj kaj teknikaj progresoj ebligas organizadon de **tutmonda komunumo**, en kiu regus paco kaj abundo, en kiu la fundamentaj liberecoj estus garantiataj al la individuoj, al la popoloj, al la nacioj.

*Kial ne estas tiel ?* Ĉar la registaroj hipnotizitaj de sia devo antaŭigi la naciajn interesojn de sia lando, for de konsento pri la necesaj transformadoj, eĉ malhelpas la agadon de la internaciaj institucioj kreitaj por defendi la universalan pacon kaj servi la homon.

**Tial, la savo povas veni nur de la monda popolo, de la individuoj ĝin konsistigantaj, de ĉiu el ni.**

La unua ago, simpla sed efika, al kies plenumo ni invitas ĉiun el vi, kiel ni mem faris, konsistas **registri sin kiel MONDCIVITANON.**

La dua paŝo, kiun ni kune faros, se vi sufiĉe multnombre respondos al nia alvoko, estos organizi sur transnacia bazo la balotelekton de delegitoj komisiotaj por defendi la homan aferon, esprimi la depostulojn de la monda popolo, kaj fine ellabori la leĝon de pacema kaj civilizita mondo. »

Se vi deziras ricevi vian Mondcivitanan legitimkarton, sendu la ĉi-suban formulon plenigitan kaj subskribitan kun la monsumo : 15 € (8 € okaze de malfacilaĵo) al :

**Civitanoj de la Mondo, Les Nids, 49190 ST-AUBIN DE LUIGNE (Francio)**

Vi povas pagi :

Aŭ per poŝta ĝiro al "R.C.M." 2 848 94 Y PARIS, **IBAN** : FR 46 30041 00001 0284894Y020 02

aŭ per monbiletoj sub koverto

Aŭ per internacia poŝtmandato

Aŭ per ĝiro al la UEA-konto : mciv-a.

%-----

*"Konscia pri miaj respondecoj kaj decidinte akiri la rekonon de miaj rajtoj kiel membro de la tutmonda komunumo, mi petas, konservante mian ŝtatanecon, esti registrita kiel **mondcivitano**".*

NOMO (per majusklaĵ presliteroj)..... FRAŬLINA NOMO.....

PERSONAJ NOMOJ ..... Profesio .....

Naskiĝdato ..... Naskiĝloko .....

Loĝeja adreso .....

Poŝta adreso (kesto) .....

Poŝta kodo .....URBO, ..... Lando : .....

la .....

(subskribo)

◆ Laŭeble sendu vian **foton por legitimilo**

◆ **Indiku la lingvon** de via legitimkarto :  
angla, araba, esperanto, franca, germana,  
greka, hispana, itala, japana, nederlanda,  
portugala, sveda.



# AL MONDAJ PROBLEMOJ, ...TUTMONDAJ SOLVOJ

La ĝerموj de perfortoj,

*kiom* estas la mizero de la plimulto rilate al la abundo,  
kiun ĝuas malplimulto da terloĝantoj, la atmosferaj kaj akvaj poluadoj,  
la akaparo kaj la malŝparado de la fosiliaj energifontoj  
kaj de la maloftaj krudmaterialoj, la rapidega popolkreskado, la mona malordo,  
la plioftiĝo de perfortoj, de militoj kaj de fenomenoj pri sociaj ruiniĝoj...

*tiom* problemas mondnivele kaj superas la kompetentecon de la naciŝtatoj.

Jen la momento ekkonscii pri nia mondcivitaneco...

*Ni deklaru nin  
civitanoj de la mondo !*

**Ĉiu el ni sentu sin solidara de la tuta homaro.**

**La ŝtatoj de la tuta mondo aŭdos nian voĉon nur se ni estos  
nenombrebla popolo kunigita**

En 1966, **13** monde famaj **Mondcivitanoj** lanĉis deklaron alvokantan por la sinregistrigo kiel mondcivitanon kaj por la balotelektado de delegitoj komisiotaj defendi la homan aferon, esprimi la depostulojn de la monda popolo, kaj fine ellabori la leĝon de pacema kaj civilizita mondo.

Dekmiloj da homoj tra la tuta mondo respondis al ĉi tiu alvoko kaj 10 transnaciaj balotelektoj invitis ĉirkaŭ 100.000 homojn balotelekti por iu **Kongreso de la Popoloj**.

En 1996, okaze de la tridekjariĝo de tiu alvoko, la **Elektitaj Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj** denove instigis la civitanojn el ĉiuj landoj deklari sin Civitanoj de la Mondo.

.../...

REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ (66 bd Vincent Auriol, FR 75013 PARIS) estas ne-registara organizaĵo.

Kiel ĉiu dokumento liverata de NRO, la **mondcivitana legitimkarto ne estas rekonata de la naciaj ŝtatoj, kaj ĝi neniel liberigas el la regula havigo de tiaj oficialaj dokumentoj**, kiaj ŝtata legitimkarto, pasporto, vizo, laborkarto, restadkarto aŭ aliaj.

La mondcivitana legitimkarto estas simbola pri onia natura aparteno al la monda komunumo, sed ankaŭ pri volo iam vidi la problemojn komunajn al la tuta homaro solvatajn per juro kaj per leĝaro el monda demokratio. Posedi tiun karton, montri ĝin al siaj amikoj, siaj kunrilatantoj, samvaloras kiel konstante deklari, ke la mondo ankoraŭ ne finis sian strukturadon, ke ĝi ankoraŭ ne unuiĝis, kaj ke en ĝi la homaj rajtoj ankoraŭ ne povas esti garantiataj.

<http://www.recim.org>